

# ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN-1565 3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo


האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

Novelo "Esperanto" de Amos Oz

Spertoj el la 100-a UK en Lillo

Bronŝtejn pri judaj rusaj poetoj

La Israela Esperanto-Kongreso:  
spertoj de la 16a, invito al la 17a



|                  |                             |                       |   |
|------------------|-----------------------------|-----------------------|---|
| <i>Redaktoro</i> | <i>Provlegantoj</i>         | <i>ELI-Prezidanto</i> | <i>Redakcia adreso</i>  |
| Amri Wandel      | Gabi Zeevi<br>Eldad Salzman | Amri Wandel           | P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo<br><a href="mailto:eli@esperanto.org.il">eli@esperanto.org.il</a> |



## *Karaj legantoj,*

Anstataŭ la somera numero de jarkolekto 2015 vi ricevis kiel ekster-serian numeron la novelon "Esperanto" de Amos Oz en Esperanto-traduko. En tiu ĉi numero troviĝas la historio pri la naskiĝo de tiu traduko. Aldone estas artikoloj pri la 16-a Israela Kongreso kaj postkongreso, spertoj de israela familio dum la 100-a UK en Lillo, artikolo pri la judaj poetoj en Rusio, de la juda-rusa poeto kaj bardo Mikaelo Bronŝtejn, kaj dorse invito al la 17-a Israela Kongreso en Jafo. *Amri*

## *Retejo:*

<http://esperanto.org.il/ie.html>  
Fondita 1959 kiel *Nia Ligilo*

## *Enpaĝigo:*

kaj fotoj sen indiko de fotisto  
A.Wandel

*Kovrilo:* Verkisto Amos Oz  
kun Amri Wandel dum la  
Jerusalema Libro-Foiro (p.3).

## *Abontarifo eksterlanda:*

10 EUR. Eblas pagi per UEA-  
konto *elia-q* aŭ mendi ĉe la  
Libroservo de UEA.

## Enhavo

- 3 Esperanto-agado en Israelo dum 2015
- 3 Novelo "Esperanto" de Amos Oz - en Esperanto..... *A. Wandel*
- 6 La 16-a Israela Kongreso en Yehiam ..... *A. Wandel*
- 8 Patro, filino kaj nova sperto en Israelo..... *Jan Navratil*
- 9 Esperanto en la Intenacia Libro-Foiro de Jerusalemo..... *A. Wandel*
- 11 Spertoj de la Universala Kongreso en Lillo ..... *Dror Gaon*
- 16 Min trafis feliĉ' esti rusa Poeto - parto 1 ..... *Mikaelo Bronŝtejn*

# Esperanto-agado en Israelo dum 2015

---

**Febuaro.** Dum unu semajno funkciis Esperanto-budo en la Internacia Jerusalema Libro-Foiro (vidu artikolon sur paĝo 9).

**Aprilo.** Komenciĝis du Esperanto-kursoj en Jerusalemo kaj Tel-Avivo. Ambaŭ instruis Gian Piero Savio.

Okazis la 16-a Israela Esperanto-Kongreso en Yehiam (vidu artikolojn sur paĝoj 6-9).

**Junio.** Estis eldonita la novelo "Esperanto" de Amos Oz en Esperanto. Vidu artikolon en paĝoj 3-5.

En **Julio** rekorda nombro de 18 israelanoj partoprenis en la jubilea Universala Kongreso en Lillo. Vidu artikolon sur paĝo 11.

## La novelo "Esperanto" de Amos Oz - en Esperanta vesto

**A.Wandel**

---

*Aperis en Revuo Esperanto, Julio 2015*

En majo 2015 E-Ligo en Israelo eldonis Esperanto-tradukon de la novelo "Esperanto", de Amos Oz, la plej fama israela verkisto. Tradukis Gian Piero Savio kaj A. Wandel. La 24-paĝa broŝuro estas aĉetebla ĉe ELI aŭ UEA por 4,5 eŭroj, kaj ankaŭ en la Libroservo en Lillo.

Amos Oz estas verŝajne la plej elstara kaj internacie konata verkisto de Israelo. Se en la proksimaj jaroj dua israela verkisto ricevos la Nobel-Premion pri literaturo (la unua estis Ŝmuel Josef Agnon en 1966), tiu verŝajne estos Oz (ekde 2007 li plurfoje estis kandidato por la Nobel-premio). Li ricevis i.a. la Premion de Israelo kaj la Goethe- kaj Heine-premiojn pri literaturo. Liaj verkoj estas tradukitaj en kvardek du lingvojn (tiu ĉi unua traduko de Oz en Esperanton estas do la 43-a lingvo). Ili estas

multe aprezataj kaj ŝatataj en la monda literaturo. Inter liaj 38 libroj, plej famiĝis "Mia Mikaelo" kaj "Rakonto de amo kaj mallumo". Ofte liaj verkoj reflektas lian vivsperton; kiel infano Oz kreskis en Jerusalemo, kiun poste, kiel knabo, li forlasis por vivi en kibuco. Pluraj el liaj noveloj tuŝas aŭ pritemas la kibucan vivon kaj la vivon en Jerusalemo.

En la novelaro "Inter amikoj", el kiu "Esperanto" estas parto, Oz revenas al la loko kaj tempo, kie kreskis lia verkaro: la kibuca socio en la fino de la kvindekaj jaroj. Li provas rompi la idealisman bildon de la kibuco (simile al aliaj israelaj verkistoj, kiel ekzemple Meir Šalev). La noveloj en tiu ĉi libro priskribas kiel ŝanĝiĝis la kibuca idealismo de la pioniraj tagoj, tiel ke nuntempe restas nur grupo de homoj, kies antaŭaj frateco kaj reciproka respondeco iom post iom malaperas. La ok rakontoj en la libro *Inter amikoj* okazas

en la fantazia kibuco Jikhat, kaj priskribas kiel la kibuco malebligas al nekonformaj kaj solecaj individuoj trovi sian lokon en la kibuca socio. Ĉiu el la rakontoj desegnas mirinde delikatajn bildojn de virinoj kaj viroj, kiuj revas kaj suferas en sia privata vivo, en la ombro de giganta kolektiva revo: la kibuca idealo.

La morto de Marteno Vandenberg, la heroo en la novelo "Esperanto", la lasta idealisto kiu kredas je absoluta komuneco de la homa socio, reprezentas la malrapidan sed neeviteblan kolapson de la kibuca idealo kaj tradicia socio. Eble la trankvileco kiun spertas Osnat, la amikino de Marteno, post lia entombigo, sugestas ke Oz fine trovis la konkludon de sia serĉado, kaj, kiel Osnat, trovas konsolon en la revolucio de la kibuca socio kaj idealoj. Amos Oz daŭre akompanas nin per sia flua kaj elokventa stilo, kaj ni povas ĝui ĉiun frazon aŭ metaforon, kiun li dividas kun ni.



Antaŭ preskaŭ unu jaro mi ricevis de mia germana amikino leteron, kiu instigis min traduki tiun rakonton en Esperanton. Post kelkaj monatoj mi rimarkis, ke Amos Oz prelegos pri sia nova libro, "Judaso", en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo. Mi skribis al Oz petante lian permeson traduki lian novelon, kaj li reagis entuziasme, dirante ke ĉiam li deziris konatiĝi kun Esperanto. Responde mi dankis kaj invitis lin al nia Esperanto-budo en la Foiro, por senpere konatiĝi kun la lingvo kaj ĝia literaturo.

Traduki tiun ĉi novelon estis komplika tasko, ĉar krom kompletan regon de la fonto- kaj cel-lingvoj ĝi postulis bonan konon de la socia kaj kultura fono de tiuj epoko (fino de la kvindekaj jaroj) kaj medio (la kibuco). Kvankam mi estis tiam juna knabo kaj kreskis en la urbo, mi ofte vizitis kaj eĉ laboris dum la lernejoj en la kibuco kie loĝis mia fratino. Tiel mi sorbis iom de la kibucaj etoso kaj vivstilo, aldone al tio kion oni lernas kaj aŭdas kreskante en Israelo, kies kulturo estas forte ligita al la kibucaj ideoj kaj socio. Ofte ni longe cerbumis, kiu estu la plej preciza kaj taŭga traduko, kiu plej zorge transdonu la etoson kaj la nuancon, kiujn celis la verkisto.

Post la prelego de Oz en la Foiro mi donis al li malnetaĵon de la traduko. Ne estis tempo longe interparoli pro la granda nombro de aŭskultantoj kiuj deziris akiri lian aŭtografon, do mi proponis renkontiĝi poste, por aŭdi pri lia speciala sinteno por "tiu mirinda lingvo", kiel li priskribas Esperanton en la novelo. Ni renkontiĝis en eta kafejo apud lia hejmo en Tel-Avivo. Mi donis al li kelkajn ekzemplerojn de la traduko, ĵus alvenintajn de la presejo. Li tre ekcitiĝis, kaj diris, ke "vidi tiun ĉi novelon en Esperanto-traduko estas por mi plenumo de revo".

Kiel aludas la komentoj pri Esperanto en la novelo, Oz scias pri E-o surprize multe, kvankam li asertis, ke li ne parolas ĝin. Mi scivolis pri la fonto de tiu kono, kaj li rakontis, ke lia patro, kiu scipovis 11 lingvojn, konis ankaŭ Esperanton kaj estis admiranto de Zamenhof. Ni konversaciis pli ol duonhoron. Mi donacis du infanlibrojn, kiujn mi tradukis en E-on, kaj Oz petis, ke mi skribu en ili kelkajn personajn vortojn. Kompense li skribis dediĉon en mia ekzemplero de lia libro "Inter Amikoj": "al Amri Wandel, kiu ludis miajn hebreaĵajn vortojn per Esperanto-piano... kun granda ekscitiĝo, danko kaj estimo... Amos Oz". Mi rakontis pri la jubilea Kongreso en Lillo, kaj li tre interesiĝis kaj scivolis pri la temo, la

programo kaj pri la prezentado de novaj libroj kaj Esperanto-literaturo. Post iom da tempo li sendis retmesaĝon: "Kara Amri, bonvolu transdoni mianome varman saluton al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso, kaj diru al ili ke Marteno Vandenberg esprimas ankaŭ miajn sentojn por la lingvo Esperanto kaj por ĝiaj fundaj ideoj".



## La 16-a Israela Kongreso en kibuco Yehiam

**A.Wandel**

*Aperis en La Ondo de Esperanto, Majo 2015*

La ĉi-jara Israela Kongreso de Esperanto okazis de 16-18.4.2015 en gastejo apud kibuco Yehiam, en la nordo de Israelo, proksime de Akko. Partoprenis 26 personoj, tri eksterlandanoj (el Ĉeĥio kaj Francio). Matene ĝis la tagmezo okazis du duontagaj natur-ekskursoj laŭlonge de du apudaj riveretoj: rivero Yehiam kaj rivero Kziv. La kleriga programo okazis en la klubejo de la kibuco. Ĝi konsistis el speciala vespero de personaj rakontoj okaze de la Holokaŭsta memortago sub gvido de Gila, instrua prelego kaj lingvaj ludoj en Esperanto, lumbilda kaj muzika vojaĝo tra antaŭaj Israelaj Kongresoj kaj ferma diskuto. Kunorganizis: Nava Bilitzki, Jael Ŝelaĥ, Amri Wandel kaj Jehoŝua Tilleman. Fotoj:



<https://picasaweb.google.com/105030054444214202226/IsraelaKongresoYehiam2015>

Post la kongreso okazis la tradicia plurtaga ekskurso por la eksterlandaj partoprenantoj, je 19-21.4. Oni vizitis la Mortan Maron, Masadon, Jerikon kaj Jerusalemon. En la unua tago oni grimpis krutan kanjonon Tamar en la sudo de la Morta Maro, kie estis necese uzi fiksitajn eskalojn kaj ŝnurojn. Vespere oni banis sin en a Morta Maro. La sekvan tagon oni grimpis antaŭ la sunleviĝo al Masado, por spekti la sunleviĝon de ĝia supro, kaj sekve oni denove banis sin en la Morta Maro kaj piediris en kanjona rivero Arugot en la oazo Ein Gedi. Vespere oni vizitis la palestinan urbon Jeriko. En la tria tago oni vizitis la Oliven Monton en Jerusalemo, kaj aparte la preĝejon "Patro Nia", kie oni povas spekti la samnoman preĝon skribitan sur la muroj en pli ol cent lingvoj, inkluzive de Esperanto. Posttagmeze okazis vizito al la Holokaŭsta muzeo "Jad Vaŝem". Partoprenis la tri eksterlandaj gastoj kaj kvin israelaj samideanoj. Ĉîceronis Amri.

Fotoj:<https://picasaweb.google.com/105030054444214202226/IsraelaPostkongreso2015>



# Patro, filino kaj nova sperto en Israelo

Jan Navratil, Ĉeĥio

Mi komencu per la lastaj frazoj de mia raporto "Mia sperto en Israelo" de 2011. "Mi vizitis Israelon jam 6-foje kaj ĉiam la lando surprizis min kaj same riĉigis min. Kiu scias, kiam mi denove venos viziti ĝin..."

Fine de 2014 mi interkonsetis kun mia filino Veronika (29-jara) kune viziti Israelon en aprilo 2015. Mi volis montri al ŝi tiun mondon, kien mi ĉiam ĝoje revenis, prezenti al ŝi miajn israelajn geamikojn. Verdire, ŝi iomete timis viziti Israelon, ĉar ŝi havis iom da neobjektivaj informoj pri la vivo en Israelo. Bonŝance mi tamen sukcesis ŝin konvinki.

Kompreneble mi deziris kunligi la privatan viziton en Israelo kun patroveno en la Israela Kongreso de Esperanto en Yehiam, kaj renkontiĝi kun geamikoj.

Do, mi venis al Israelo la sepan fojon. Estis agrable, kiel ni ambaŭ havis amikan subtenon de miaj israelaj amikoj – tuj de la alflugo al flughaveno Ben Gurion ĝis lasta minuto de adiaŭo denove en la flughaveno. Eran kiel kutime multe helpis al ni dum la tuta restado, mi sentis kiel en mano de patro.

Ni vojaĝis diversmaniere de Tel-Avivo al la nordo -Yehiam, de la nordo al la vilaĝo Tzoran Kadima - la hejmo de Eran. Plue al la Morta Maro, Masado, diversaj kanjonoj, Jeriko, Jerusalemo kaj denove al Tel-Avivo. Ni veturis aŭtomobile, trajne, buse. Ĉio estis bone organizata, ke ni glate ŝanĝis veturilojn, bone vojaĝis helpe de diversaj amikoj, tute senprobleme.





Ni vizitis multajn lokojn. Mia filino estis tre scivolema, ŝi interesiĝis pri ĉio, lokoj plaĉis al ŝi. En la Morta Maro ŝi estis tre petolema, mi vidis ŝin kiel junan knabinecon. Frumatene ni grimpis al la pinto de Masado, de kie ni spektis la sunleviĝon, tio estis por ni profunda impresio.

Mi tre ŝatas grimpi tra kanjonoj, kaj ni vizitis kelkajn. Ni ankaŭ planis trairi du kanjonojn en Ein Gedi – David kaj Arugot. Pro alia riĉa programo ni ne sukcesis tragrimpi ambaŭ kanjonojn. Mi iomete bedaŭris, ke mi ne sukcesis trairi la tutan kanjonon David kaj montri al mia filino ĝiajn belajn akvofalojn. Sed ni vizitis la apudan kanjonon Arugot kaj bone ĝuis. Ni baniĝis en la rivereto kaj petolis kiel infanoj. Estis bona amuziĝo.

Ni ankaŭ havis eblecon viziti la urbon Jeriko, kie ni vespermanĝis. Estis por ni aventuro. Dum la ekskursoj nia ĉiĉerono Amri bone zorgis pri la tuta grupo, ĉiam estis helpema, trankvila. Ni sentis sekure.

Estis iom alia sperto de miaj antaŭaj vizitoj de Israelo. Unuafoje mi venis al Israelo duope, kun mia filino. Dum la vojo ni havis tempon por ni mem, ni pli komprenis unu la alian. Veronika konatiĝis kun miaj amikoj, ekkonis interesajn lokojn en Israelo kaj vidis per propraj okuloj, ke Israelo ne estas danĝera lando. Ŝalom, Jan.

## Esperanto en la Intenacia Libro-Foiro de Jerusalemo

A.Wandel

*Aperis en La Ondo de Esperanto, Marto 2015*

En la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo ([www.jbookfair.com/](http://www.jbookfair.com/)) unu el la plej prestiĝaj en la mondo, okazanta ĉiun duan jaron ekde 1963. Jam de pluraj jaroj ELI tie organizas budon, kie oni prezentas Esperanto-librojn kaj okazigas publikan prelegon pri Esperanto.



Tiuokaze oni prezentas Esperanton al miloj da vizitantoj de la Foiro, kaj ofte renkontiĝas kun verkistoj kaj gravuloj. Dum la solena inaŭguro de la Jerusalema Libro-Foiro oni donas la Jerusalemo-premion al eksterlanda verkisto. Ĉi-jare ricevis la premion la albana verkisto Ismail Kadere. Salutis la nova prezidento de Israelo Reuven Rivlin, la urbestro Barkat (alta protektanto de la Azia Kongreso en 2013), kaj la prezidanto de la premio-juĝkomisiono, antaŭa vic-ĉefministro de Israelo Dan Meridor. Post la inaŭguro A. Wandel alparolis Meridor, kiu interesiĝis pri Esperanto ĉar la onklo de lia patrino estis Immanuel Olsvanger, unu el la pioniroj de Esperanto en Palestino antaŭ ĉirkaŭ okdek jaroj. En la Esperanto-budo oni varbis por kursoj kaj vendis diversajn eldonaĵojn de ELI, ĉefe vortarojn Esperanta-hebrean kaj hebrea-Esperantan kaj KD-on de Israelaj Kantoj en Esperanto. Ĉirkaŭ 30 personoj interesiĝis pri Esperanto-kurso, kaj sekve komenciĝis kurso en Jerusalemo. En la lasta vespero de la Foiro okazis publika prelego de A. Wandel pri la temo "Esperanto – ne kion vi pensis", kiun partoprenis ĉ. 30 personoj.



En antaŭaj Libro-Foiroj esperantistoj renkontiĝis kun famuloj kiel prezidento Ŝimon Peres (alta protektanto de la UK en Tel Avivo), Umberto Eco, kaj famaj israelaj verkistoj David Grosman kaj A.B. Jehoŝua. Sed ĉi-foje okazis la plej signifa renkontiĝo ĝis nun. Kelkajn

monatojn antaŭ la Foiro, A. Wandel skribis al la plej fama (ankaŭ internacie) verkisto de Israelo, Amos Oz, proponis renkontiĝi dum la Foiro kaj petis lian permeson esperantigi la rakonton "Esperanto", parto de lia novelaro "Inter Amikoj" – rakontoj pri la kibuca vivo. Amos Oz respondis varme kaj akceptis ambaŭ proponojn. Dum la Foiro Oz prezentis sian novan imponan romanon "Judaso". Post la publika prelego A. Wandel alparolis lin kaj donacis libreton kun la traduko. Poste Oz skribis ke li estis tre tuŝita pro la E-traduko de "Esperanto", kiu estis por li "realigo de revo". Sekve li akceptis renkontiĝi por rakonti, kial Esperanto estas speciala por li kaj intervjuiĝi por la bulteno "Israela Esperantisto".

## **La 100-a UK en Lillo - spertoj de israela familio**

**Dror Gaon, tradukis A.Wandel**

*Rekorda nombro de 18 israelaj esperantistoj partoprenis la jubilean Universalan Kongreson, pluraj aktive partoprenis en la programo. Inter ili estis du Esperanto-familioj: Dror kaj Ŝirli Gaon, kun la filino Topaz, kaj Amri kaj Gila Wandel kun la filino Tali. Jen la sperto de la unua familio. Fine troviĝas la unua alineo de la hebrelingva originala teksto.*

### **Ni komencu je la fino.**

Sabato, la 2.8.2015, estas la ferma tago de la kongreso kaj de nia reveno hejmen. Post ok tagoj en Lillo ni finfine havas la okazon iom turismi en la kongresa urbo. Sekve mi (sole) revenas al la kongresejo por ĉeesti la finon de la Fermo kaj adiaŭi malnovajn kaj novajn geamikojn. Ĉe la enirejo mi renkontas Tali, kiu jam adiaŭis siajn gepatrojn, ili survojas al Usono. Sur la scenejo okazas la transdono de la flago. Akceptas ĝin Peter Balaz, prezidanto de la LKK de la venontjara Kongreso en Nitro. Petro invitas Dorota, sian ĉarman kunlaborantinon. Li surprizas ŝin kaj ĉiujn ĉeestantojn, proponante geedziĝon! Sendube unu el la plej emociaj momentoj de la Kongreso. Kvankam estas multaj E-istaj geedzaj paroj, estas unike gefianĉiĝi dum la jubilea Kongreso antaŭ dumil kongresanoj... Eble tiu estas unu el la grandaj aferoj, kiuj efektive komenciĝis en Bulonjo sur Maro, ne for de ĉi tie, kaj daŭras jam de 1905...

La Kongreso finiĝis, ĉiuj survojas kun valizoj, iuj al kastelo Greziljono, iuj al la Internacia Junulara Kongreso, kaj aliaj revenas hejmen. Mi adiaŭas ĉiujn geamikojn el Vjetnamio, Ĉinio, kaj Neil, la UEA-representanton en UN, partoprenintoj en la IJK en Israelo en 2013, en Nazareto. Mi revenas al la hotelo, kie atendadas la familio. Jen koncize la defio de la tuta semajno - kombini la Kongreson kaj la familion.



### **Alia defio: la genuo paneas**

Preskaŭ du semajnojn pli frue, matene, la filino Topaz oreŝire krias: "Helpon! panjo falis!". En stratangulo mi trovis la edzinon Ŝirli kuŝanta. La genuo kiu ŝin ĝenis jam longan tempon perfidis, kaj nur ambulanco sukcesis ŝin movi. Fine de la tago ni kune forlasis la hospitalon kun paŝhelpilo sed feliĉe sen frakturoj.

Ni bonege prepariĝis por la vojaĝo - flugbiletoj, trajnbiletoj de Parizo al Lillo kaj revene, kaj eĉ biletoj por viziti la amuzparkon Asterikso, sed la genua paneo ne estis planita. Amikoj kaj la familio admonis nin nuligi la vojaĝon: "Francio atendas", ili diris - sed centa jubileo ja okazas nur unu fojon en 100... aŭ 110 jaroj. Ni decidis ne rezigni kaj ek al la centa UK! Vojaĝi kun paŝhelpilo ne estis facila, sed ĉie troviĝis helpemaj personoj.

Ĉie ni devis uzi taksiojn, kaj malkovris ke taksisoforoj, eĉ en Parizo, apenaŭ parolas la anglan.

## Alveno

Ĉie ni vidis soldatojn. Unufoje en la placo apud la preĝejo de Montmartre. Tri soldatoj kun pafiloj en atakpozicio. Surprize ni vidis soldatajn triopojn ankaŭ nokte en la ĉefa placo kaj la stacidomo de Lillo. Eĉ en la centra placo de Bulonjo ni renkontis ilin. Kaj alia signo de la epoko: gardistoj kontrolas kaj petas malfermi sakojn. Ni, israelanoj, kutimas al tio, sed aliaj, francoj, germanoj kaj precipe japanoj ne komprenas... Kvankam ni ne interkonsentis, jam survoje kaj alvenante ni renkontis plurajn israelajn samideanojn Ni flugis de Israelo al Parizo kun Malvina kaj Matilda, en la stacidomo en Lillo ni renkontis Amri kaj Gila, kiuj alvenis de Parizo sur la sama trajno, kaj loĝis kun Jael en la sama hotelo.

Kiel novulo kun familio, la Kongreso estis por mi iom mistera. Ekzemple, sabate elĉerpiĝis la libro de Boris Kolker [Vojaĝo en Esperantolando] antaŭ ol mi sukcesis trovi la Libroservon. Vespere ni venis iom malfrue al la Movada Foiro, ĉar ni devis serĉi Topaz, kiu ŝajne estis ŝokita pro la nombro de israelanoj kiuj ŝin rekonis. Mi helpis ĉe la israela tablo en la

Foiro, kaj promenis en la halo por impresiĝi de la aliaj pli ol cent tabloj,

renkonti

geamikojn kiujn

mi jam konis de

antaŭe (Kiel

Flama de

Vjetnamio, Neil el

Novjorko, ktp) kaj

aliajn, kiujn mi

konis nur pere de la

sociaj retoj. Mi ĝojis renkonti persone la ĉarman

ĉilean kuraciston José Antonio Vergara, la sola estrarano de UEA, kiun mi

vidis en la Foiro.





## Densa programo

Dimanĉe okazis la Solena Inaŭguro. Mi alvenis ĝustatempe kaj trovis lokon en la supra etaĝo de salono Zamenhof. Mi sukcesis foti de pluraj anguloj, inkluzive la salutanton nome de Israelo, nia Cvi Ŝolt. Mi estis kontenta vidi Veronika Poor, kiun mi jam konis de antaŭe, sidiganta ne fore de mi. Pli poste en la Kongreso ni estis informitaj, ke ŝi estis nomumita por anstataŭigi la legendan Ĝeneralan Direktoron Osmo Buller. Post la Inaŭguro mi revenis al la familio por kune lunĉi, kaj tuj reen al la kongresejo. En la programo estis ĉina ekspozicio kaj koncerto de Kajto. De la ĉinaj samideanoj mi sukcesis informiĝi pri la Azia Kongreso en 2016 - "Ĝi okazos en novembro, sed bonvolu eniri...". La ekspozicio prezentis la urbon Qingdao, estis foto-ekspozicio, paroladoj de Renato kaj aliaj eminentuloj. Ĉar devis komenciĝi la koncerto de Kajto, mi adiaŭis la ceremonion en la ekspozicio, sed trovis, ke preskaŭ ĉiuj pordoj al la halo de la koncerto estis jam fermitaj. Mi sukcesis eniri tra malantaŭa pordo al plenŝtopita halo - ĉiuj sidlokoj kaj ĉiuj transirejoj kaj ĉio inter ili estis plena de spektantoj. Sur la scenejo jam kantis la fama nederlanda duopo, ili (kiel kutime) provizis ravan koncerton, kiu pravigis mian penon eniri la salonon. Esploro en la Kongresa Libro montris, ke post la koncerto okazas apude prelego de Amri. Mi eniris iomete post la komenco, ĉefe por foti, sed restis ĝis la fino. Estis la unua el tri prelegoj kadre de la Internacia Kongresa Universitato pri Einstein kaj la teorio de relativeco. Malsame al la aliaj prelegoj de tiu serio, tiu prelego okazis en la ĉefa Kongresejo kaj ne en alia loko fore en la urbo.



## **Ekskursoj kaj aliaj programeroj**

Por ne komplete neglekti la familion, ni aliĝis al du kongresaj ekskursoj: lunde ni iris al Bruĝo, kaj ĵaŭde al Bulonjo-sur-Mar, sekvante la unuan kongreson. La ekskursan tagon ni pasigis en la Asteriks-parko. La klarigoj en la ekskursoj estis en Esperanto, kiun Ŝirli kaj Topaz ne komprenis, kaj mia kapablo interpreti estis limigita. En ambaŭ ekskursoj ni estis ĉiam lastaj. En Bruĝo mia edzino kaj filino rezignis pri parto de la ekskurso kaj atendis en iu restoracio. En ambaŭ ekskursoj ni manĝis en bonaj restoracioj kaj vizitis la urbo-centrojn.

Dum la Kongreso mi tamen aŭdis plurajn prelegojn. Aparte interesa estis la prelego de Humphrey Tonkin pri ESF. Humphrey ne estas teknike lerta, sed estas unu el la plej bonaj prelegantoj, ĉiam interesa kaj fascina. Dum "TEJO sin prezentas" mi renkontis Boris Mandirola kaj aliajn geamikojn de TEJO, kaj konsultis kun ili, kiel progresigi la lokan TEJO-aktivecon kaj varbi loke inter gejunuloj. Dum kunsido pri la 60-a datreveno de la Unesko-deklaracio mi renkontis Mark Fettes, prezidanto de UEA, kaj kelkajn estraranojn. Resume estis fascina sperto sed multe da laboro. Eblas kompreni la prezidanton de la LKK, kiu diris en la ferma ceremonio, ke li nur volas dormi. Dankon al la organizantoj kaj al ĉiuj partoprenantoj.

## **רשמי משפחה מכינוס האספרנטו העולמי ה-100 בצרפת דרור גאון**

אתחיל מהסוף.

שבת בבוקר 2.8.2015. יום הנעילה של הקונגרס והחזרה ( שלנו ) הביתה. בעשר בבוקר מתחיל טקס הסיום ואילו אני עם המשפחה באוטובוס של לשכת התיירות המקומית. סוף סוף אנחנו עושים סיבוב להכרת האתרים השונים של העיר בה אנחנו נמצאים כבר שמונה ימים. בסוף הסיוור הלכתי (לבד) להיפרד מכל החברים החדשים והישנים בקונגרס. בכניסה פגשתי את טלי ונדל שהספיקה להפרד מההורים שכבר המשיכו בדרכם לארה"ב. הגעתי לקראת סופו של טקס הסיום. ל"העברת הדגל" עולה לבמה פטר באלאש, יו"ר הועדה המארגנת של הקונגרס בשנה הבאה בניטרה, סלובקיה. פטר עובר לפסים אישיים ומזמין לבמה את דורותה המקסימה שעובדת איתו, ואז מפתיע אותה ואת כולנו ומבקש את ידה! ללא ספק זהו אחד הרגעים המרגשים של הכנס ואולי בכלל. אמנם יש לא מעט זוגות בתנועת האספרנטו, אבל מי עוד זכה להציע נישואין בכנס ה-100 מול יותר מ-2000 איש? ואולי זה אחד מהדברים הגדולים שהתחילו לא רחוק מאן, בכינוס האספרנטו הראשון ב-

1905... והנה הסתיים הקונגרס, וכולם כבר על המזוודות, מי בדרך לנופש אספרנטו בטירת גרזיון, מי בדרך לכינוס הצעירים, ומי פשוט חוזר הביתה. גפרדתי מכל החברים מויאטנם, סין ועוד, ומגיל (נחום) נציג UEA באו"ם, שהשתתפו בכינוס הצעירים הבינלאומי בנצרת ב-2013 וחזרתי למלון, למשפחה. זהו בעצם על קצה המזלג האתגר של כל השבוע – שילוב של השתתפות בכנס ולהיות עם המשפחה.

## **Min trafis feliĉ' esti rusa poeto... parto 1**

Poetoj juddevenaj en la rusa poezio de la 20-a jarcento

**Mikaelo Bronŝtejn, Rusio**

---

*Mi estas elektinta nur kelkajn poetojn arbitre, do tiujn, kiujn plej ŝatas mi mem. Kaj mi estos tre kontenta, se ankaŭ vi ekŝatos ilin pere de miaj tradukoj. Por tiuj, kiuj ŝatus legi pli multajn poemojn mi donu referencon al la libro, samnoma kun tiu ĉi artikolo: "Min trafis feliĉ' esti rusa poeto...", eldonita de eldonejo Impeto, en Moskvo 2012 [http://impeto.trovu.com/rusa\\_poeto](http://impeto.trovu.com/rusa_poeto)*

### ***Prefaco***

Mi neniam estis ŝovinisto. Mia nuna aĝo fidine garantias, ke mi jam ne havas ŝancon iĝi tiu. Tion mi devas diri unuavice, ĉar sonis kelkaj ĉi direktaj akuzoj dum miaj diverslandaj prelegoj pri la temo. Nu, antaŭ proponi al eventualaj legantoj de tiu artikolo, mi ja sobre pripensis eventualan ekfulmon de simila opinio en ies kapo, kaj mi havis pretan respondon: ne kaj ne, mi ne estas ŝovinisto. Por mi, - naskita en juda familio, instruita en ukraina lernejo, loĝanta dum kelkaj jardekoj en Rusio, - la lingvoj de tiuj tri gentoj (miaj gentoj, mi diru) estas absolute kaj ĝisfunde egalvaloraj, eĉ se mi ofte uzas ilin ne egale. Cetere, mi opinias, ke per la jam publikigitaj verkaroj de Aleksandr Puŝkin kaj Ivan Franko, kie mi partoprenis traduke kaj kompile, estas klare montrita mia estimo al du el tiuj tri gentoj. Venis do vico por la tria.

La fenomeno ekzistas kiel fakto. La fenomeno, bone esprimata per pli-malpli konata spritaĵo: "La granda rusa poeto NN naskiĝis en malriĉa juda

familio”. Efektive, el inter pli ol cento da etnoj, loĝantaj en Rusio dum periodo historie longtempa, neniu etno faris tiom gravan kontribuon al la rusa literaturo de la 20-a jarcento, kiom kontribuis ĝuste tiu naskitaj en judaj familioj. Spite al diversaj limigoj, malpermesoj kaj rektaj persekutoj fare de la ŝtata potenco, verkado en la rusa lingvo estis ilia konscia elekto, kaj la tutan forton de sia talento ĉiu el ili konscie metis en la trezorejon de la rusa kulturo.

Ĉu vere ili estis tiom multaj? Do foje, dum mia junaĝo, mi havis diskuton pri tio kun mia amiko – ruso, arda poeziamanto, kia estis ankaŭ mi. Post longa diskutado ni decidis veti: ĉiu el ni laŭvice nomu unu faman poeton, li – la rusdevenan, mi – la juddevenan. Kiu stumblos la unua, tiu estu malgajninto. Blok – diris mia amiko, Mandelŝtam – mi rebatis, Brjusov – li diris, Erenburg – diris mi, Majakovskij – li, Selvinskij – mi, Tvardovskij – li, Pasternak – mi... Venkis, certe, mia amiko, sed – post, eble, kvaronhora nomumado kaj kun aperinta granda estimo al la popolo, tiom riĉe kaj malavare provizinta la rusan poezion.

Ĉu estas la fenomeno nur rusia? Certe, ne. Juddevenaj talentuloj kontribuis al la kulturo de pluraj etnoj eŭropaj; mi nomu almenaŭ unu el tiuj: Heinrich Heine. Tamen nenie aliloke la knaboj el judaj familioj invadis la kulturon, kaj speciale la poezion, tiom amase.

Ĉu estas ia klarigo por tiu fenomeno? Mi havas propran, eble ne tiun, kiun povas prezenti pli doktaj esplorantoj.

Mi diru, ke temas eĉ pri du fenomenoj. La unua, nome, ke la invado okazis nur en la komenco de la 20-a jarcento, havas facilan klarigon. Nur en la komenco de la 20-a jarcento la judoj en la Rusia imperio ricevis konsiderindan liberigon de la ŝtataj kontraŭjudaj leĝoj, funkciintaj antaŭe. Ekzemple, de la deviga loĝado ekster la grandurboj, nur en la lokoj, anoncitaj de la ŝtato (“Ĉerta osedlosti”<sup>1</sup>)...

Pri la dua endas diri pli vaste. Kiam la grandurboj, sekve ankaŭ la grandurba gazetaro malfermiĝis por la judoj, evidentiĝis, ke inter tiuj estas aro da personoj, edukitaj dulingve, posedantaj la literaturan rusan lingvon multe pli perfekte kaj kapablaj esprimi sin en la rusa multe pli trafe, elegante kaj klare ol iliaj rusaj rivaloj. Ĝuste la idoj de la juda gento, neniu alia el inter cent gentoj de Rusio, lasis sian hejmlingvon, elektinte apliki la talenton en la rusa, iĝinta por ili pli grava ol la gepatra. Ĉar, krom la krea,

1 Ĉerta osedlosti - Areo por loĝiĝo (rus) - teritorioj en la regionoj de Ruslando, kie la judoj havis rajton je konstanta loĝado

tiuj idoj havis ankoraŭ unu, ne malpli gravan talenton: akcepti la lingvon, la kulturon, la historion de la loĝlando samprofunde, aŭ eĉ pli profunde ol sian propran lingvon, kulturon, historion. Memkompreneble – por venki en la rivala konkurenco.

Nun mi parolu pri la poetoj. Ili estis diversaj. Absolute, konsterne diversaj. Tradiciemuloj kaj kunfondintoj de novaj poeziaj fluoj. Revoluciuloj kaj konservativuloj. Dorlotataj kaj persekutataj de la regantoj. Kompreneblaj por ĉiu ajn leganto aŭ nur por certa elita societo. Sed ĉiu el ili nepre postlasis en la rusa literatura trezorejo frandindajn poemojn, kiuj meritas atenton de la tuta homaro...nu, almenaŭ de ĉiu vera ŝatanto de la poezio. Kaj du el ili eĉ fariĝis Nobelpremiitoj!

Mi ŝatus, ke tion frandu ankaŭ esperantistoj. Do por vi, kara leganto, mi estis faranta kaj poluranta tradukojn de iliaj verkoj ene de la lastaj dudek jaroj de mia vivo.

Verkaro de mia plej ŝatata poeto, Iosif (Joseph) Brodskij, tradukita en Esperanton, estis eldonita jam dufoje kun la titolo “De nenie kun amo...”. Tiun poeton do mi ne prezentu ĉi-sube, miaopinie, sufiĉas la referenco al la libro por ke ĉiu deziranto trovu ĝin.

Pri kelkaj aliaj poetoj, kiujn mi ŝatas, mi prezentu kurtajn biografiojn kaj ekzemplojn de ilia poezio.

### **1. Dmitrij Cenzor (1877 – 1947)**

Mi volas komenci la prezentadon de la poeto, preskaŭ tute nekonata al la nuntempa legantaro. Tamen mia londona amiko, tradukisto Kris Long nomas lin “Antaŭ-Pasternaka Pasternak”. Mi opinias tiun difinon treege trafa.

Dmitrij Miĥajloviĉ Cenzor naskiĝis en familio de malriĉa juda tajloro. Lia infana kaj junula aĝo pasis en Jaroslavl. Li mem skribis, ke ekde la infanaĝo multajn poeziajn travivaĵojn en li vekis virina figuro. Tiam li ekverkis naivajn poemetojn. Estante 17-jara, Dmitrij venis en Litovion; tie li havis malfeliĉon pli bone ekkoni la vivon de juda malriĉularo en la fifama “ĉerta osedlosti”. La junulo interesiĝis pri sociaj sciencoj, pri aspiroj de la proleta junularo kaj ekverkis anstataŭ lirikon civitanecajn poemojn. La rusa revolucio de 1905 trovis la poeton en Peterburgo, kaj, engaĝita en la revolucia movado, li publikigis multajn poemojn en la bolŝevika gazetaro. Aleksandr Blok diris poste pri li:



*“Dmitrij Cenzor estas kreitaĵo de la peterburga bohemia de unu el la lastaj formiĝoj, kiu, siavice, estis kreita de la revolucio 1905”.*

En la sovetia tempo Cenzor iĝis membro de la Komunista partio kaj verkadis ĉefe porinfanajn kaj humurajn poemojn por la satiraj revuoj “Begemot”, “Smeĥaĉ”, “Puŝka” k.a., ankaŭ vortojn de kantoj, tiutempe popularaj.

Dmitrij Cenzor eldonis ses poemarojn, tamen la nunan tempon ĝisvivis nur liaj plej bonaj lirikaĵoj, kiun konas ĉiu adoranto de la poezio de la Arĝenta epoko.

### ***La lun’ kaj la poeto***

La lun’ eliras sur la vojon.  
Kvieta. Kun la olda splen’.  
Ni amikiĝis tiun fojon  
Kaj kune vagas ĝis maten’.

Se iu venas la unua,  
L’amikon gvas en mallum’.  
Hodiaŭ por la randevuo  
Kvieton gardas mia lun’.

Por mia trist’ eliro mankas,  
Mi ĉion tagan hatas nun.  
L’forgeson noktan ŝatas ambaŭ –  
L’poet’ kaj la naiva lun’

Ĝi plektas ombrojn kun radioj,  
Juvelojn ŝutas el la for’  
Mi, en la rond’ de l’ revoj miaj -  
Koramikinoj sen la korp’.

Kaj ĝis maten’ solece paŝas  
Mi sen kompat’ en la silent’,  
Se ĝin en nubaj ondoj kaŝas  
La diafana nokta vent’.

Neniu vidis, nek atentis  
L'animan ploron de l'pasi'  
Nun la unua vi alvenis,  
Sed morgaŭ, certe, venos mi.  
*1914*

## 2. Osip Mandelŝtam (1891 – 1938)

*“Peterburgo posedas la judan kvartalon: tiu komenciĝas tuj malantaŭ la Mariinskij-teatro, tie, kie frostas negocanoj, trans la prizona anĝelo de la Litova kastelo, forbrulinta dum la Revolucio. Tie...oni povas renkonti judajn afiŝojn kun bovo kaj bovino, virinojn kun falsa hararo, eliĝanta el-sub kaptuko, kaj paŝetantajn en la ĝisteraj surtutoj multspertajn kaj bebamajn oldulojn.*

*La sinagogo kun siaj konusformaj ĉapoj kaj cepsimilaj sferoj, kvazaŭ pompa fremda figarbo perdiĝas inter mizeraj konstruaĵoj. Veluraj biretoj kun kvastoj, elturmentitaj pedeloj kaj kantoroj, aroj da sepbrakaj kandelabroj, altaj veluraj kamilavkoj. La juda ŝipo kun laŭtaj aldaj korusoj, kun korskuaj infanaj voĉoj navigas plenele, disigita far iu antikva ŝtormo al la vira kaj la virina partoj... La ĉefkantorero, kiel la fortulo Samson, estis disrompanta la leonan konstruaĵon, al li reehis la veluraj kamilavkoj, kaj la mirinda interrilato de vokaloj kaj konsonantoj en la klare elparolataj vortoj, disponigis al la kantado nevenkeblan forton.”*

***O. Mandelŝtam, el "La kaoso judea"***

Osip Emiljeviĉ Mandelŝtam naskiĝis en Varsovio. Lia patro - Emil Mandelŝtam, finstudinta en la berlina Talmudlernejo, iĝis negocisto de la unua gildo; la patrino, Flora Verblovskaja, estis muzikistino, devenanta el intelektula familio.

En 1897 familio Mandelŝtam transloĝiĝis en Sankt-Peterburgon. Tie Osip sukcese finstudis en la fama lernejo de Teniŝev. En 1907-1908 li frekventis filologian fakultaton en Sorbono, Parizo, poste, ĝis 1911 – en la universitato de Heidelberg kaj en la Sankt-Peterburga universitato.

En Sankt-Peterburgo la juna poeto konatiĝis kun la tiamaj majstroj de la poezia metio – Aleksandr Blok, Nikolaj Gumiljov, amikiĝis kun Anna Aĥmatova kaj multaj aliaj poetoj. Lia debuta poemlibreto “Ŝtono” aperis en Sankt-Peterburgo en 1913. Sekvis “Tristia” (1922) kaj “Poemoj” (1928). La poemoj de Osip Mandelŝtam sonas solene kaj elokvente, lia lingvaĵo estas esprimplena kaj rafinite bela. Anna Aĥmatova opiniis lin la plej brila rusa poeto de la jarcento.

Krom la poemkolektoj, aperis kelkaj prozaj libroj de Mandelŝtam: “Bruo de l’tempo” (1925), “Egipta marko” (1928), “Pri poezio” (1928) kaj “Parolado pri Dante” (1933, eldonita en 1967).

En 1934 pro sia kontraŭstalina poemo “Ni ne sentas la landon sub ni...” Mandelŝtam estis arestita kaj ekzilita por tri jaroj al Voroneĵ. Sed Stalin neniam forgesis la vortojn pri la “vasta brusto oseta” speciale ofendajn por kartvelo. En 1938 la poeto estis denove arestita kaj ekzilita al la Fora Oriento. Samjare li mortis en koncentrejo apud Vladivostok.

Liaj verkoj estis longtempe malpermesataj en Soveta Unio kaj komencis esti reeldonataj nur en la sepdekaj jaroj.

\* \* \*

Neesprimeblas la angor’,  
Okulojn grandajn malferminta,-  
Vekiĝis la florumo tinta  
Kaj sian lumon plaŭdis for.

La ĉambro plenas je arom’  
De l’ tristo - dolĉa kuracilo!  
Ensbis tiom da trankvilo  
La eta regno - mia dom’.

Iom da maja sunavid’,  
Iom el densaj ruĝaj vinoj,  
Kaj la blankec’ de l’ mincaj fingroj,  
Rompanta l’ mincon de biskvit’.

### 3. Saŝa Ĉornij (1880 – 1932)

*“Saŝa Ĉornij apartenas al tiu rara tipo de artisto, kies rido estas fermentita per larmoj. Foje Arsenij Tarkovskij nomis lin granda humoristo kaj satiristo. La titolo estas honora, sed mi opinias, ke Saŝa Ĉornij devas esti kalkulata ĉe iom alia metiejo. Li apartenis al tiu unika branĉo de la literaturo, kiun oni nomas tragikomedio, kun ties senŝanĝaj simboloj – teatraj maskoj de funebro kaj rido.*

*Anatolij Ivanov*

Saša Ĉornij (Aleksandr Miĥajloviĉ Glikberg) naskiĝis en Odeso, la havenurbo kun speciala etoso kaj speciala etna miksaĵo de rusoj, judoj, ukrainoj, grekoj, moldavoj... La miksaĵo provizinta al la rusa literaturo aron da talentegaj verkistoj kaj poetoj.

En la multinfana juda familio nek la patro, tre ofte oficvojaĝinta, nek la patrino, ĉiam malsana kaj nervoziĝema, bone prizorgis la infanojn. Nur unu aferon utilan faris la patro – por ebligi al la infanoj gimnazian kleron (la kvanto de judaj infanoj, akceptataj en gimnazion, estis draste limigita) li baptis ĉiujn al la rusortodoksa eklezio. Sed Aleksandr ne longe restis gimnaziano. Post jara studado li forlasis kaj la gimnazion, kaj la hejmon, iĝinte strata almozpetanto. Hazarde pri lia sorto artikolis loka ĵurnalo, kaj la knabon prenis al sia hejmo K. Roŝe, altranga oficisto kaj poeziŝatanto, kiu fakte iĝis la dua patro por li. Dank’ al tiu persono Aleksandr atingis la sesan klason de gimnazio, sed poste foriris pro konflikto kun la direktoro, kaj preskaŭ tuj atingis la militservon. Post dujara militservado li eklaboris en doganejo, poste verkadis felietonojn por provinca ĵurnalo, poste foriris Peterburgon kaj trovis lokon de estranga sekretario ĉe la fervoja administrejo. Longa estas lia spertiĝo vivi en la trista mondo, kie li elkribis temojn por siaj ŝercaj poemoj.

La unua el tiuj sub pseŭdonimo “Saša Ĉornij” estas publikigita nur en 1905 kaj kaŭzis cenzuran fermon de la revuo en kiu ĝi estis publikigita. En la lando brulegis la unua revolucio, kaj la cenzuro malpermesis ankaŭ lian unuan poemlibreton “Diversaj motivoj”. Sed ekde tiam Saša Ĉornij iĝis konata kaj verkis arde eĉ dum sia dujaraj studado (1906-1908) en la Heidelberga universitato. Reveninte Peterburgon kaj kunlaborante en la plej fama satira revuo “Satirikon”, Saša Ĉornij eldonis tri librojn da ŝerca, satira kaj pensiga poezio. Li ekverkis ankaŭ porinfanajn poemojn kaj prozon, eldoninte antaŭ la Unua mondmilito kelkajn librojn. Ho, la publiko adoris lin. Eĉ la fama Majakovskij ŝategis la poemojn de Saša Ĉornij, konis ilin parkere kaj ofte ilin deklamis.

Dum la Unua Mondmilito la poeto militservis kiel soldato en milita hospitalo.

Ne akceptinte la bolŝevikan revolucion, li fuĝis en Litovion, poste en Germanion. Ekde 1920 Saša Ĉornij loĝis en Berlino, aktive partoprenante la vivon de la t.n. “Rusa Berlino”. Tie aperis kelkaj el liaj novaj libroj.

En 1924 li transloĝiĝis en Parizon kaj eklaboris en la ruslingva gazetararo, regule aperigante prozajn kaj poeziajn verkojn, ĉefe por infanoj. Liaj lastaj

vivojaroj pasis en la bieneto La Faviere kiun li aĉetis; tie li forpasis pro koratako 52 jarojn aĝa. Lia tombo estis detruita dum la Dua Mondmilito. Memkompreneble, la verkoj, eĉ porinfanaj, de la elmigrinto Saša Ĉornij ne estis permesataj por publikigo en Sovetunio ĝis la morto de Stalin. Nur en la sesdekaj jaroj fama porinfana verkisto Kornej Ĉukovskij iniciatis eldonon de lia unuvoluma verkaro.

### ***Du opinioj***

“La formo bagatelas! – voĉoj sonas. –  
Se glason el kristal’ plenigu sterko,  
Ĉu restos la kristala glas’ ĉefverko?”

“Stultuloj! – la aliaj tuj oponas. –  
En nokta vazo eĉ ĉampano hela  
Abomenindas por la buŝ’ nobela.”

Nur bedaŭrindas ĉi diskut-batal’ –  
Ja eblas trinki... *vinon el kristal’*.

### ***Du deziroj***

1. Loĝi sur roko nuda,  
Verki simplajn sonetojn...  
Kaj preni en val’ apuda  
Panon, vinon, kotletojn.

2. Bruligi ŝipojn antaŭ mi kaj spure,  
Sen zorgoj enlitiĝi, droni en  
Sensongâ dorm’, kaj pro scivolo nure  
Vekiĝi post jarcent’.

*Daŭrigota en la venonta n-ro*



## La 17-a Israela Esperanto-Kongreso - Jafo 14-16.4.2016

En 2016 la Israela Kongreso okazos en la historia kaj vigle noviĝanta urbo Jafo, la suda parto de Tel-Avivo. Kiel kutime, ni havos tritagan Esperanto-feston kun riĉa programo, la artan parton gvidos Kajto kun koncerto kaj muzikaj eroj. Okazos duontagaj ekskursoj al la turismaj perloj de Jafo. Ni kongresos, tranoktos kaj manĝos en la komforta hotelo Ruth Daniel, kun detala retejo (ankaŭ en la angla) <http://www.mishkenot-jaffa.co.il/>. Por eksterlandaj gastoj du tranoktoj en du-persona ĉambro inkl. maten- kaj vespermanĝojn kostas 700 NIS (160 euroj); sen vespermanĝo 550 NIS (120 euroj). Por israelanoj 800 kaj 700 NIS.

**Programo:** ĉiutage posttagmeze 16-19h kleriga programo (sabate 15-17h), vendrede kaj sabate inter la 9-14h - ekskurso, ĵaŭde kaj vendrede 19-20h vespermanĝo, 20-22h distra programo/koncerto. **Antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj:**  
12-14.4.2016 – Haifo kaj Akko, Nazareto, Tiberiado kaj lago de Galileo.  
17-21.4.2016 – Jerusalemo, La Morta Maro, Masado, Eilat kaj Petra (Jordanio) - kun Kajto! Ambaŭ estos plene akompanataj en Esperanto, de profesia diplomita ĉiĉerono. Aliĝo – ĉe: [eli@esperanto.org.il/ik.html](mailto:eli@esperanto.org.il/ik.html)

**Bonvenon al  
Tel-Avivo-Jafo** ★

★

★

**La 17-a  
Israela Kongreso  
de ESPERANTO**

**14-16.04.2016**

כינוס האספרנטו הישראלי מועד האספרנטו הישראלי

